

Tagiĝo 32

Cirkulero de Esperanto Junularo en ĈSR - eldonas: Dům Osvěty, odbor Esperanto
redaktas: Kuzník Jaroslav, Rooseveltova 17, Opava 1956/VI

INVITO

al jarkunveno de la esperantista junularo en ĈSR, kiu okazos
28 - 29 julio 1956 en Hradec u Opavy (en la kastelo).

La kunvenon partoprenos i.a. 1a partoprenantoj de Somera Esperantista Tendaro kaj eksterlandaj gastoj el Nederlando kaj Hungarujo.

Programo :

Sabate 28/7: 19. h. Kultura kaj amuza programo

Dimanĉe 29/7 8,30 h: jarkunveno.

1. Malfermo, himno.	3 (min.)
2. Salutoj	3
3. Resumo pri la pasintjara jarkunveno kaj pri ĝia rezolucio	4
4. Referato de la ĉefdelegito pri plej bonaj grupoj kaj laborantoj	30
5. Referato de la kultura delegito	15
6. Referato de la "Tagiĝo"- redaktoro	10
7. Elekto de gvidantaro	15
8. Agadplano 1955-57	10
9. Proponoj kaj diskuto (parolos ĉefe reg. delegitoj pri efektivaj problemoj, proponoj, plibonigojn, rezolucio	90

3 horojn

10. Fermo kaj kanto "Ni, Esperanta Junularo" .

Ĉiu rondeto klopodu esti reprezentata. Aliĝojn por tranoktado sendu antaŭ la 20-a de julio al:
Kuzník Jaroslav, Opava, Rooseveltova 17.

- o o o -

Lastmomente venis el Praha tiu ĉi telegramo:

"Hodiaŭ transdonis deputito de ĉina popola parlamento, kamarado

"Hujucz al ĉefdelegito Mařík saluton por ĉeĥoslovaka Esperanto

"Junularo kaj reproduktaĵon de ĉina majstro kun dediĉo. Mařík "

Mládež před VI. festivalem
(La junularo antaŭ la VI-a Festivalo).

Leningrad: Leningradská mládež se obrátila v svolání, tištěném v esperantu, k mládeži celého světa s výzvou k navázání úzké spolupráce před VI. světovým festivalem mládeže v Moskvě 1957 pomocí esperanta - jazyka, kterému se může do festivalu snadno každý naučit. Ve výzvě leningradské mládeže se praví m. j.:

“Připravujíc se na VI. světový festival mládeže v Moskvě 1957, leningradská mládež si vytvořila amatérský estrádní soubor. V souboru nás pracuje přes sto - hudebníků, tanečníků, vyprávěčů, kouzelníků, loutkařů a jiných mladých nadšenců umění. Připravujeme na festival velkou estrádní revue, která, jak doufáme, se vám bude líbit.

Přátelé! Seznamme se už před festivalem a v Moskvě se setkejme již jako dobří známí! Navrhujeme vám, zahraniční přátelé, abychom si začali kolektivně i jednotlivě dopisovat. Navrhujeme výměnu písní, milovaných mládeží celého světa, hudebnin pro orchestry, tanečních skladeb, plakátů, programů, fotografií amatérských uměleckých skupin mládeže a td.

Zkušenost z minulých festivalů ukazuje, že jazykové překážky rozdělují účastníky. Na posledním festivalu ve Varšavě bylo více než 100 delegátů z několik desítek zemí, kteří spolu volně hovořili mezinárodním jazykem esperantem. Rozhodli jsme se, že si do festivalu osvojíme tuto snadnou řeč, které se může naučit každý v době co nejkratší. Vyzýváme vás, abyste následovali našeho příkladu. Nahraďme "řeč" posunků a úsměvů opravdovým účinným hovorem, rozbijme zeď, která nás dělí!

Očekáváme, přátelé, vaše odpovědi na naši výzvu! Pište ihned a pošlete nám též všechny časopisy, které naši výzvu otisknou!

Naše adresa je: Leningrad -22, Kirevskij prosp., 42 Domo de Kulturo de Industri-Produktada Kooperero. Al la Junulara Ansamblo. S.S.S.R.

Ni vokas niajn grupojn, tuj kontakti kun la leningrada junularo. Informu nin poste pri la rezultoj. Nia Centrejo sendis al Leningrad sepaĝan raporton pri la laboro de la ĉs. esperantista junularo.

(Resumo: Leningrado junularo turniĝas en proklamo, presita en esperanto, al la tutmonda junularo kun la alvoko komenci efikan kunlaboron por partopreno en la VI-a Tutmonda Junularo Festivalo en Moskva 1957 helpe de Esperanto, de la lingvo, kiun ĉiu junulo povas facile ellerni antaŭ la ĝisnunan "lingvon" gestan per efektiva parolo kaj interkompreniĝo. La Leningrado Junulara Ansamblo proponas interŝanĝon de kantoj, muziknotoj, afiŝoj k.s. Kontakto kun ĝi kaj kontaktigu vialandan junularon.)

•••

Redaktejo de gazeto: POPOLA DEMOKRACIO sendis al Dům Osvěty P. Bezručě, odbor Esperanto en Opava ĉi tiun sciigon:

"Ni dankas per la alsendo de leningrada alvoko, pri kiu ni publikigos taŭgan raporton. Ankaŭ estonte ni bonvenigos mallongajn informojn sciigojn pri via laboro. Kun amika saluto: LIDOVÁ DEMOKRACIE.

INFORMO:

Por sendi leteron en eksterlandon ne estas plu necese prezenti ĝin persone en la poŝtoŝicejo. Sufiĉas meti ĝin en leterkeston kun ĝusta afranko. Tamen plena adreso de la forsendinto devas esti skribita sur la koverto. (Decido de la ĉs. poŝto).

•o -

ITI per Esperanto.

Okaze de la Internacia Tago de Infanoj iniciatis s-ano O. Schwetter en Havířov interesan aranĝon: internacian gimnastikon konkurson inter 10 lernejoj en diversaj landoj.

La aranĝo vekis viglan intereson de la instruistoj. (Ni esperas aperigi venonte pli detalan raporton).

Ĉu ni veturos al Moskva?

La esperantista junularo en ĈSR tre ŝatus partopreni la VI-an Tutmondan Festivalon de Junularo en Moskva 1957. TKKE sendis al la Centra Komitato de la Ĉeĥoslovaka Junulara Asocio (ĈSM) en Praha jena petskribon:

"La tutŝtata Konsulta Komitato Esperantisto en ĈSR, junulara sekcio, turnas sin al vi kun peto envicigi junajn esperantistojn, membrojn de ĈSM, en la delegacion de la Ĉeĥoslovaka Junulara Asocio al la Tutmonda Junularo Festivalo en Moskva 1957, nome 5 delegitojn kaj 4 anstataŭantojn. La Tutmonda Federacio de Demokrata Junularo en Budapest okupos sin serioze sufiĉe longan tempon pri esperanto kaj ĝi preparas, laŭ plano de la organiza komitato en Moskva, esperantistan tendaron ĉe la Tutmonda Junulara Festivalo en Moskva. TFDJ faras tion post tre bonaj spertoj, akiritaj ĉe la internacia esperantista renkontiĝo en la pasintjara festivalo en Varsovio,..."

(ktp. Sekvis ankoraŭ tri paĝoj de informoj pri la ĉs. esp. junularo kaj pri esperanto ĝenerale).

La Centra Komitato de ĈSM respondis al ni per letero de 28-a de junio (ni tradukas):

"Rilate vian peton ni sciigas, ke la delegitojn por la festivalo aprobas la regionaj komitatoj de ĈSM en kunlaboro kun la bazaj organizoj kaj distriktaj komitatoj de ĈSM, kiuj aktive laboras en niaj organizoj kaj organoj. Aliaj specialaj delegacioj ne estos starigataj. Karel Hanka, estro de la I-a sekcio de CK-ĈSM."

Fariĝi ano de la delegacio de ĈSM oni do povas pere de la lokaj grupoj kaj distriktaj komitatoj de ĈSM. Ĉar la delegacio estos konsistigita jam en julio 1956, aranĝu la aferon de aniĝo ĉe la delegacio rapide en viaj lokoj.

(TKKE-junulara sekcio)

- O -

RAPORTOJ PRI LA ENLANDA JUNULARA ESPERANTO MOVADO

(Laŭ raportoj de la regionaj delegitoj):

I. Praha-K. Vary-Ústí n.L. (RD V Novotný) (aprilo):

Praha. Regulaj kunvenoj okazas (escepte de julio kaj aŭgusto). Kelkaj membroj ludis kun Verda Ĉaro en la dramoj Maryša, La Patrino kaj Pygmelion. Pluraj membroj aliĝis al SET.

Most: La junulara rondeto estis disigita de la estraro de OK--klubo pro dubindaj motivoj. TKKR intervenis pro tio ĉe ÚRO. La loka delegito Venda ne funkcias. La verdan flameton tenas s-ano Uhlík.

Karlovy Vary: Kunvenoj merkrede en la bandomo Dukla; nova kurso komencita kun 15 part. S-ano Mikesko el Třinec vizite prezentis amuzan programon.

III. Plzeň (RD J. Hořejší) (februaro – majo):

Plzeň: malgranda aktiveco de la junulara grupo pro preparoj de gestudentoj por abiturienta ekzameno. Partoprenintoj de la elementa kurso, kiu finiĝis en majo, ricevis atestojn kaj insignojn kaj anigis ĉe la kurso aŭ junulara grupo, kiu nun denove havas pli ol 10 membrojn. Vendrede okazas konversaciaj kunvenoj 18-20 h en Anglický dvůr, merkrede kolektiva vizito al kulturaj entreprenoj. 4 membroj aliĝis al SET, unu el Nýřany. Alia kurso okazos en la teknika altlernejo (d-ro Černý). - La favoranta Plzeň TKKE (Vítek) intervenis ĉe ÚRO en Praha por faciligi situacion de la klubo en Plzeň.

Plasy: Okazas kurso gvidata de Menšík. Mankas vidanto por gvidi junularon.

El Cheb ne venis raporto.

Rokycany mutas ĝis nun.

IV. Pardubice, Hradec Kr., Liberec (RD K.Franc) (aprilo-junio):

(Laŭ cirkuleroj 14 kaj 16; 15 ni ne ricevis!)

Lanškroun: Kunvenoj ĉiun duan semajnon kun konversacio kaj raportoj. En aprilo oni ripetis la tutan gramatikon. 18.5. solena kunveno kun ĉeesto de gepatroj: 11 A-kursanoj post sukcesa ekzameno ricevis atestojn kaj insignojn kaj ĉiuj aliĝis al B-kurso, krome 3 al SET. Ekzamenis Kobza helpata de Cicvárek, Pícek, Wernerová. (Sendu al RD korekton por la matrikulo!).

Hradec Králové: Grupo en Kuracista Akademio havas ses esperdonajn studentojn, kiuj regule

kunvenas. Grupo en industria lernejo gvidata de edukisto Esenreich havis komence 10 knabojn. La grupo Hradec (ĝenerala) ne estas speciale junularo.

Pardubice: Elementan kurson finis 15 ekzamenitoj el 20 aliĝintoj. La ĉiusemajna kunveno estas dediĉata al kursoj konversacaj kaj perfektigaj, al raportoj kaj la lasta ĵaŭdo al amuza vespereto kun la celo, ke ĉiu ano kunlaboru en la programo (en majo lumbildoj kun esp. klarigoj.) Ĝis nun nur kelkaj membroj preparas ĉion. Necesas, ke ĉiu helpu - ne timu! La rondeton formas vi ĉiuj. - Ok anoj partoprenis laborkunvenon en Poděbrady.

Jablunné n.O.: Malgraŭ klopodo de RD neniu kontakto kun la grupo. S-ano Werner obstine silentas. (Ĉu iu sukcesos paroligi lin?)

Notu novan adreson de RD: Karel Franc, Dukla 2287, Pardubice.

V. Brno, Jihlava (R.D O.Kaláb), (aprilo - junio):

Brno. 16 membroj prezentis duhoran programon en regiona konferenco en Třebíč. 8.5. la Junularo prezentis en la Esp. Klubo valoran programon "Bukedeto por la panjo", Kaláb tutvesperan prelegon. 10 membroj aliĝis al SET. (Dankon por foto de rolintoj en "Karusele"!)

Jihlava: ekzistas 5 aktivaj s-anoj krom la pli aĝaj. Ili preparas fondon de rondeto en Regiona Domo de Kulturo. RBdK intencas organizi esp. rondetojn ankaŭ ĉe la Distrikta Domoj. La samideanoj tradukas fabelojn kaj libron de rakontoj; iliaj du poemojn enpresis Heroldo de E.

Adreso: "Jar. Hůda, Brněnská 16, Jihlava.

Kroměříž: ne sendis raportojn. (Kial? Certe ankaŭ tie io okazas).

Svitavy: kunvenas 10 membroj. La grupo disponigis desegnaĵojn el Japanujo al Distrikta Muzeo por ekspozicia vitrino. Leter-paperoj kaj kovertoj kun esp. surskriboj propagandas la urbon. MNV (urbestraro) ricevis per la grupo bondeziron el Francio je jubileo de la urbo. Raporto pri signifo de E. en la pacbatalo prezentita en kunveno ĉe la Distrikta Komitato de Pacdefendantoj.

Třebíč: Sukcese daŭras kursoj A,B,C. Kunvenoj normalaj, komitataj kaj por geknaboj krom kvar ekskursoj. La regiona partia organo "Jiskra" enpresis 25.5. longan artikolon kun esp. titolo "La verda stacio" t.e. Třebíč, tre favoran al esperanto (eĉ troigan rilate nombrojn), kiu raportas pri la vivo de nia grupo. Por la movado en la regiono la artikolo havas gravan signifon. Unu el la publikigitaj fotoj estas pri SET 1955.

Žďár n.Sáz.: ekzamenoj en la A-kurso havis bonan rezulton. B-kurso ankaŭ bonnivela. Du komunaj ekskursoj okazis. Nova elementa kurso komencota post la ferioj. Regule renovigata enhavo de propagandaj kestoj estas atentata de la publiko. (En ĉiu loko estu tiel! Sep membroj aliĝis al SET.

Brno: - multobligis la alvokon ĉe Leningrada Ensenblo kaj sendis ĝin al la lokaj delegitoj, al funkciuloj de ČSM (Ĉs. Junulara Ligo) kaj al ĝia ĵurnalo Mladá fronta.

VI. Olomouc (RD V. Šimeček, Olomouc, ul. M. Pospíšilové 2)

Olomouc: Koresponda servo en la klubejo prizorgas adresojn kaj korektas leterojn de pli junaj anoj. Kelkaj novaj anoj varbitaj. La grupo iniciatas fondon de grupo kaj kurso en Supera ekonomia lernejo kun 35 kursanoj.

La Junularo enkondukis interesan novaĵon en la grupa vivo: sportan parton. La sportuloj kunvenas je unu horo pli frue.

(Ni bezonus raportojn ankaŭ pri la ceteraj grupoj en la regiono. Ni petas la RD agi laŭ nia instrukcia letero – ĈD).

VII. Ostrava-Gottwaldov (RD Dr. Kočvara) (Majo):

10.6., okazis la tradicia kunveno sur la monto Ĉantorija. 4-9.6. estis aranĝita esperanto Seminario en Třinec. - La Junularoj en Opava kaj en Ostrava dun pluraj semajnoj veturas sur la lokon de SET por tie fari ĉiujn prepartlaborojn. La celo estas: tendaro modele organizita. (Dankon por tiu ĉi oferema sindediĉo al la intereso de la junulara movado! La SET-anoj espereble scias aprezi la grandan laboron de la opavanoj kaj ostravanoj. -ĈD./ En Bludovice estis organizita Internacia Tago de Infanoj (vidu apaete). J. Skařupa, gvidanta du kursojn en Vítkov, estas petata fondi kurson en Budišov. En Místek, post parolado de TKKE-prezidanto Vitek, denove kunvenas sep s-anoj kaj

intencas fondi junularan rondeton. Nova ĉelo fondita en la plej juna urbo Havířov: kvin s-anoj kunvenas lunde sub gvido de Schwetter. Ankaŭ en Poruba 10 s-anoj volas grupiĝi.

VIII. Slovakio (M.Zvara):

La cirkonstancoj fariĝas pli ĝojigaj. Post longa balotado oni verŝajne refondos (fine de junio) la likviditan rondeton en Poprad. Poste sekvos grupoj en Sp.N.Ves kaj Košice. La grupo en Svit kunvenas neregule, tamen ĝi estas malforta kaj la renovigo de Poprad multe helpos ĝin. Zvara proponas aranĝi regionan kunvenon de la grupo Prakovce, Svit, Sp.N.Ves kaj Poprad en aŭgusto. La grupo en Bratislava kunvenas dum la ferioj komune kun la pliaĝula klubo.

Ŝajnas, ke oni jam faris vojon en la slovakon gazetaron. Post artikolo en la partia organo „Pravda“ (15.5., kie la redakcio diras i.a., ke esperanto ne estas kosmopolitismo kaj ke estas utile lerni ankaŭ ĝin) sekvis "Smena“, organo de la slovakia centra komitato de ĈSM (Junulara Ligo) kun enpresado de alvoko de la leningrada junularo sur la 1-a paĝo.

Milan Zvara estas anstataŭata dum sia foresto dum julio de M. Neubeler, Poprad 4; raporto pri sufiĉe riĉa laboro estas promesata.

- c - 0 - o -

DIVERSAJ RSPORTOJ.

Festkunveno en Poděbrady. - Esp. rondeto ĉe Distrikta popola biblioteko en Poděbrady aranĝis 3,6. festkunvenon, kiun partoprenis 66 ges-anoj el pluraj lokoj de Bohemio kaj Moravio. Nia ĉefdelegito prezentis prelegon je la temo: Esperanto kaj la junularo".

LETNÍ KOLEJ ESPERANTA V DOKSECH. - 15.7. - 28.7.1956.

I letos budou v rámci LKED uspořádány pod záštitou domu osvěty tradiční kursy mezinárodního jazyka

- A. pro začátečníky, kteří si chtějí osvojit snadno dobré základy jazyka.
- B. Pro pokročilé.
- C. pro vyspělejší - kurs konverzační.
- D. pro příští učitele esperanta a ty, kdož esperanto již znají.

Kolej obstará ubytování. Stravování si účastníci zvolí sami. Zahajovací večer v neděli 15. července 1956 v domě osvěty.

Kursové včetně ubytování v hotelu Kčs 260,-; společné Kčs 220,-

Příhlášky přijímá: Letní kolej esperanta Doksy - V. Špůr.

- 0 -

Ĉu vi estas inter ili!?

Por la celoj de ceritra kartoteko la jenaj junularaj rondetoj (lokaj grupoj) resendis al nia ĉefdelegito plenigitan matrikulon kun necesaj indikoj:

Praha, Karlovy Vary, Všeboř, Netolice, Písek, Plzeň, Pardubice, Lanškroun, Brno, Svitavy, Třebíč, Žďár n/Sáz., Olomouc, Drahotuše, Rýmařov, Ostrava (VŽKG), Ostrava-Hrabůvka, Dolní Bludovice, Opava, Příbor, Štěbořice, Vítkov.

Sume 22 lokoj.

Ĉu ceteraj sendos ankoraŭ la matrikulon al s-ano Mařík, Praha 2, Malá Štěpánská 9.

Kio ne manku en informaj kestoj.

Mi volas atentigi ĉiujn grupojn, ke ili laŭcele uzu propagandajn kaj informajn kestojn. Ni spertis, ke adreso de samideano, kiu kapablas informi ĉiujn, kiuj sin anoncos, estas en la kesteto miloble pli valora ol eĉ belega granda varbafiŝo "Uĉte se esperantu..." (Aŭ almenaŭ ĝi potencigas ĝian valoron kaj sencon). Tiamaniere anoncis sin al nia grupo dekduo da informpetantojn.

(Zd. Hršel, Hradec Králové)

La propagandaj kestetoj en Římská strato kaj apud la teatro en Vinohrady en Praha estas tre malzorgitaj. Oni i.a. propagandos por kurso okazonta en jaro 1955 (kvin). Necesas tuj interŝanĝi la enhavon!

Observanto.

EKSTERLANDAJ SAMIDEANOJ EN ĈSR.

Pluraj eksterlandaj samideanoj jam venis aŭ venos nunjare en nian landon. En junio venis al Praha (okaze de blindula sportfesto) rumana, hungara kaj ĉina s-anoj (la lasta, Ivan Ho, vicprez. de ĉina blindula ligo); juna s-anino Vilkki, filino de la finnlanda UEA - ĉefdelegito, usona s-anino; parlamentano de la Ĉina popola respubliko. En Smokovec restadis dum junio s-ano Ridlewski el Pollando; 20 poloj venis al Ĉantoryja. Jean Forge venos en julio, Anna Alano en aŭgusto. Grupo da poloj volos viziti nian jarkunvenon en Hradec u Opavy, krom hungara esp. junularestro kaj s-ano el Nederlando, kiuj intencas partopreni en SET.

- o -

SOVETIA GRUPO GASTIGOS GEJUNULOJN.

La sube menciita esp. grupo deziras korespondi kun gejunuloj, kiuj intencas kaj povos viziti la junularan festivalon em Moskva 1957. Ĝi invitas la partoprenantojn viziti la grupon kaj esti ĝiaj gastoj.

Ĝi petas ankaŭ diversajn materialojn por esp. ekspozicio en la nuna somero, kontraŭ kompenso.

Skribu al: Esperanto grupo, Petro Spodobin, Galič, - Kostramskoj, U.S.S.R.

Kion skribis al nia redakcio la leganto:

Tagiĝo kiel tio tre plaĉas al mi (kaj tion vi povas okaze menci al ĝiaj eldonantoj). Nur malgrandan mankon mi trovis tie, kiun ĉeĥo povus facile eviti. Mi nome ne nomiĝas Hršel Zdeněk, sed Zdeněk Hršel. Simile ankaŭ ne Werner Jan, sed Jan Werner. Zdeněk, Jan ktp. estas antaŭnomoj, do ili estu antaŭ la familia nomo. (Zd. Hršel)

(Red.: Dankon por la atentigo. Mi klopodos tian mankon jam plu ne fari.)

INTERŜANĜO DE PROGRAMOJ.

„Mi opinias, ke pli grandan utilon donus al ĉiuj grupoj priskribi (en Tagiĝo) pli detale iliajn programojn. Ne nur: Svitavy ... kun bonaj variaj programoj, ktp. Per la priskribo ni povus interŝanĝi la programojn kaj tiel helpi al la rondetoj. Ĉiu grupo povus uzi bonan programon de alia grupo. Ni jam pritraktis tion multfoje, sed ĝis hodiaŭ ne efektiviĝis.“

K. Franc, Pardubice.

Rim.: Mi dubas, ĉu la ideo estas efektivebla per "Tagiĝo", ĉar tiukaze ĝia amplekso devus kelkoble pligrandiĝi. Mi konsilos skribi rekte al la grupo petante la tekstojn de la bone farita programo. - J. Mařík

- o -

Pisemný kursesperanta.

Zájemci o Esperanto, kteří nemají možnost navštěvovat kurs osobně mohou se přihlásit na pisemný kurs u: Svačina Fran, Lanžhot, okr. Břeclav.

Po přihlášce (stačí korespondenční lístek) dostanete prvou lekci i s pokyny pro začátečníky i podmínky o studiu. Celý kurs má 12 lekcí a trvá asi půl roku. Přihlásit se můžete kdykoliv, jelikož vyučování je individuální. - o -

KORESPONDI DEZIRAS :

37 anoj 10-14 jaraj de Edukejo de Hungaraj Ŝtatfervojoj, deziras korespondi kaj interŝ. PM, PK-illustr. ktp. Adr.: "Juna Penso", Edukejo de M.Á.V., Répcszentgyörgy, Hungario.